## Kosto

**£274**, inkluzive de ĉiu manĝo post alveno la lundon kaj antaŭ foriro la vendredon – sub-26-jaraĝuloj rajtas peti financan helpon ĉe **nojef.org**.

## Kiam

Alveno kaj registrado okazos lundon je la 12:00. Lunĉo sekvas. Foriro okazos post lunĉo vendredon.

## Kiel atingi

Per trajno iru ĝis haltejo Stafford. Poste vi bezonos taksion. Kontaktu Viv por antaŭarranĝi taksiservon kaj dividi kostojn kun aliaj.

## Kiel mendi lokon

- Sendu ĉekon al EAB ĉe Esperanto House, Station Road, Barlaston ST12 9DE
- Sendi retmesaĝon al Viv ĉe **eab@esperanto.org.uk** por ricevi ligon por pagi perrete.



*"Kiel traduki "distra vespero" en la anglan? 'Entertainments evening' ne vere transdonas ideon pri la diverseco aŭ amuzo, ĉar ni ĝuis skeĉojn, kantojn, poemojn, legadon, melodiojn, ludojn … kaj ĵongladon."*

\- Vilĉjo Walker

La 53a ĉiujara

# Somera Festivalo

Shallowford House, Shallowford, Stone, Staffordshire ST15 0NZ

Okazas de la 12a de aŭgusto al la 16a

Gvidas: Jack Warren

Gastgvidanto: Erin Piateski




*"Mi devus diri al vi pri Shallowford House - granda domo kun belaj ĝardenoj. La tuta loĝejo estis tre pura kaj komforta. Niaj manĝoj estis bongustaj kaj abundaj.*

*Certe mi havis bonegan semajnfinon, plenan de lernado, manĝado, amuzo kaj amikeco"*

\- Jean Jamieson

# Ĉe la Somera Festivalo



## Gastgvidanto: Erin Piateski

Usonano Erin lernis Esperanton junaĝe en 1995 kaj ĝin uzas ĉiutage en internacia kadro ĉar ŝi estas ĉefa aktivulo ĉe la plej populara retejo por komencantoj Lernu.

Ŝi aparte tie respondecas pri labor-rilatoj kaj kunordigo de traduka kaj instruista laboroj.

Ni ĝojas, ke Erin afable konsentis viziti nin en Britio por partopreni la Someran Festivalon.

**Pliaj eblecoj:**

Se vi dezirus ripozan semajnon en kvieta ĉirkaŭaĵo vi estus tre bonvena veni al Shallowford por simpla "feriuma semajno", kunvenante kun la grupo por manĝoj kaj la distra vespero.

Viv kaj Emma povus helpi al vi organizi vizitojn kaj vojagojn al la City Museum por vidi la Staffordshire Hoard, al la Gladstone Pottery Museum or eĉ al Alton Towers por pli da ekscitiĝo!

Se vi veturos aŭte la Biblioteko Butler foras nur 15 minutojn. Geoffrey King, nia bibliotekisto, restos tie dum tiu semajno kaj afable helpos vizitantojn.

- Ni uzos la kroketejon (laŭ bonpermeso de la veterdioj).
- Ni kantos, do kunportu viajn petojn.
- Vesperludoj disponeblos, inkluzive de la ĉiam populara surplanka Skrablo!
- Kunportu muzikilon aŭ helpilon se vi dezirus koncertumi aŭ distri. Lastan jaron iu eĉ ĵonglis dumparole!
- Viv partoprenos la eventon kaj aranĝos surloke libroservon.



*Jam abonis homoj el fora lando kiuj vojaĝos al Britio por partopreni la eventon kaj helpi internaciigi ĝin. Se vi nur malofte havis la eblecon uzi Esperanton kun neanglalingvanoj jen kaptinda okazo!*

***La tagprograma instruado okazos en du grupoj***. Ĉe la *Progresantoj* oni precipe celas la lingvon. Ĉe la *progresintoj* oni ankaŭ pritraktos literaturon kaj esperantologion.

**La kotozo kovras** tranoktadon kaj ĉiuj manĝojn kaj refreŝigaĵojn – kontinent-stilan matenmanĝon, dupladan tagmanĝon kaj tripladan vespermanĝon, matenkafon kaj posttagmezan teon.

**Troviĝas trinkejo** en la televidĉambro kaj retaliro tra la tuta konstruaĵo.